# VIKIPEDIO

praktika manlibro

# Antaŭvorto

La ideo krei manlibron pri Vikipedio ekestis dum la germana renkontiĝo PSI. Multaj esperantistoj estis entuziasmaj pri la inform- kaj praktikadsesioj kiuj tie okazis.

Homoj konvinkiĝis post iom da klarigado kaj diskutado ke Vikipedio estas tre grava - kaj por la Esperantomovado kaj por la socio ĝenerale.

Sed multaj interesitoj timas ekkunlabori. "Ĉu oni ne devas esti fakulo por kunlabori? Ĉu ne estas komplike? Ĉu oni ne simple forigos mian kontribuon?" Konkludo estis ke estas bezonata broŝuro enkonduka. Homoj volas trankvile legi pri kio temas. Jes ja ĉiuj informoj troveblas en interreto, sed kiel novulo rapide vi dum horoj estos okupita antaŭ ol vi bone komprenos la utilon kaj funkciadon de Vikipedio.

La ideo estis simpla: krei broŝureton, presigi ĝin kaj dissendi ĝin al la landaj sekcioj de TEJO kaj al aliaj interesitoj. Okazos kursoj, kreskos Vikipedio kaj ekestos nova dinamismo trans la landlimoj.

Kiel ĉiam, por efektivigi ideon estas bezonata persistemo, (kun) laboro kaj mono. Tial mi aparte dankas kelkajn homojn pro ilia instigo, helpo en verkado kaj/aŭ financa subteno:

**Eddy Van den Bosch**, kiu konvinkis min pri la magio de Vikipedio.

**Chuck Smith**, la kreinto de la esperantlingva Vikipedio, pro multaj valoraj konsiloj.

**Arno Lagrange**, speciala administranto (burokrato) de Vikipedio, pro provlegado.

**Paul Peeraerts**, aktiva vikipediisto, pro konsiloj.

**Ilja De Coster** kaj **Lode Van de Velde**, pro helpo en la pretigo de la subvencia dosiero por TEJO.

La **estraro de TEJO** kaj la iniciatintoj de la fonduso Freŝa Vento, pro financa subteno.

**Tamás Slezák** el Hungario, pro financa subteno.

La estraroj de la **flandra kaj pola Esperanto-junularaj asocioj**, pro financa subteno.

Ĝuu la legadon!

*Yves Nevelsteen*
*yves.nevelsteen@esperanto.be*

Respondeca eldonanto / Verantwoordelijk uitgever.: Yves NEVELSTEEN, Koning Albertlaan 147 – 9000 GENT (B)

**Kio estas Vikipedio?**
Vikipedio estas reta libera kunredaktata multlingva enciklopedio, en kiu ĉiu ajn retumanto povas tre facile kunlabori, dank' al la viki-teknologio.

Kiel enciklopedio ĝi havas plej diversajn kapvortojn. Por ĉiu el ili estas unu paĝo. Sur ĉiu paĝo estas alklakebla ligilo "Redaktu" per kiu iu ajn povas ekredakti aŭ pluredakti. Interesa aspekto estas la multlingveco: el ĉiu artikolo pri iu temo en iu ajn lingvo povas esti ligiloj al samtemaj artikoloj en aliaj lingvoj.

Vikipedio ne estas enciklopedio kiel oni komprenas tiun vorton tradicie. Verki "enciklopedion" sonas kiel tasko de grandaj sciencistoj kaj fakuloj. Vikipedio ne estas tia enciklopedio! En Vikipedio vi trovos informojn pri Esperanto-renkontiĝoj apud la listo de nobelpremiitoj kaj famaj tenisuloj. Estas tute alia nivelo da detaloj.

Vikipedio ne estas "stato", ĝi estas "procezo". Procezo de kunlaboro de diversnaciaj homoj. Ĉiu artikolo estas rezulto de tiu procezo. Ĝuste Esperanto nepre bezonas tiajn projektojn.

Ankaŭ gravas, ke iu povas kontribui per tre malgranda ago. Ne necesas verki artikolon pri nuklea fiziko! (feliĉe). Jam sufiĉas korekti gramatikan eraron, aldoni ligilon aŭ iun alian etan detalon.

**Historio de Vikipedio**
Iam unu persono, Plinius la Granda, verkis la unuan enciklopedion tute sola. Estis homo kun multege da scio pri la mondo. Poste, ĉar plikomplikiĝis la mondo, laŭ modelo de la Encyclopædia Brittanica, specialistoj en sia fako kontribuis tion kion ili plej bone konas.

Tiu ĉi modelo "de la dua generacio" funkcias ĝis nun. Vikipedio estas nova modelo; ĉiu povas kontribui, korekti erarojn, ĝisdatigi ktp. Eble bezonatas centoj da "ordinaraj homoj" por atingi la nivelon de Plinius, sed estas multege da kontribuantoj de Vikipedio.

Vikipedio naskiĝis je la 15-a de januaro 2001 kiel posteulo de la projekto "Nupedia", kiu postulis ke redaktantoj estu vere kompetentaj. Ĉar tro malrapide kreskis la nombro de artikoloj, Jimmy Wales decidis malfermi la redaktadon al ĉiuj kun nova koncepto: vikio.

## Enkonduko

Unue ekzistis nur anglalingva versio, sed la projekto rapide fariĝis plurlingva. La 15-an de novembro 2001, Chuck Smith fondis la esperantlingvan Vikipedion. Li diras mem pri tio: "Kiam mi havis la ideon fondi esperantlingvan Vikipedion, mi trovis Enciklopedion Kalblandan, kiun verkis Stefano Kalb. Post kiam Stefano konsentis translokigi siajn 139 artikolojn al Vikipedio, mi kunlabore kun Jerry Muelver kaj Stefano vikipediigis lian enciklopedion."

La 2-an de januaro 2002 la Esperanto-Vikipedio jam havis 300 paĝojn. Ekde tiam la internacia lingvo daŭre okupas bonan pozicion inter la plej vaste uzataj lingvoj de la mondo. Dum unu semajno ĝi estis eĉ pli granda ol la germana! Dum la unuaj jaroj de Vikipedio, ĝi restis en la 5-a pozicio, sed kompreneble post iom da tempo, alilingvaj Vikipedioj kun pli da parolantoj pli aktivis. Je la 22-a de oktobro 2006 la esperantlingva Vikipedio ekhavis 60.000 artikolojn.

Vikipedio kreskas tiom rapide en la diversaj lingvoj ne nur per individua redaktado de artikoloj. Diversaj programistoj sisteme alŝutis datumbazojn. En la anglalingva Vikipedio ekzemple komplete vi retrovos la intertempe liberajn eldonojn de enciklopedio Encyclopædia Britannica (ekzemple tiu de 1907). Al la esperantlingva Vikipedio programisto alŝutis ekzemple la Enclikopedion de Esperanto kiu aperis en Budapeŝto en la jaro 1934.

**Grava multlingva projekto**

Gravas ke en tiu ĉi multlingva projekto Esperanto aperas inter la plej gravaj lingvoj de la mondo, kvankam Esperantoparolantoj estas malpli multnombraj ol parolantoj de la menciitaj aliaj lingvoj.

Tion oni povas danki al konstantaj penoj de volontula multnacia redaktantaro: miloj da kontribuantoj, inter kiuj kelkdek tre aktivaj, laboris por ekkonstrui tiun ĉi vastan projekton, kies celo estas krei kiel eble plej kompletan fonton de scioj pri ĉiuj temoj.

En la Vikipedio ĉiu unuopa artikolo estas ligita al ĉiuj samtemaj artikoloj en ĉiuj aliaj lingvoj: sekve ĉiufoje kiam iu artikolo ekzistas en Esperanto, legantoj de la samtema artikolo en la aliaj lingvoj povas vidi ke ĝi ekzistas kaj povas rigardi ĝin tre facile per simpla alklako sur la vorto "Esperanto" kiu aperas en la flanka strio de la paĝo.

Ju pli valora estos la esperantlingva Vikipedio, des pli indos por la estontaj generacioj lerni la lingvon, ĉar ili scios, ke ili povos trovi

helpon en siaj studoj ĉi tie. La fenomeno jam funkcias por la plej disvolviĝintaj Vikipedioj: lernantoj, studentoj, instruistoj kaj ĉiu ajn pli kaj pli aliras Vikipedion por tie trovi fidindajn respondojn al siaj demandoj.

La retpaĝaro de Vikipedio kaj de ties idaj projektoj (Vikivortaro, Vikicitaro, Vikispecioj, Vikinovaĵoj, Vikilibroj, ...) nun staras inter la plej vizitataj retpaĝaroj en la mondo.

La vikipedian miraklon ni devas danki al la vikitekniko, kiu ebligas al ĉiu ajn retumanto tuj fariĝi kunredaktanto per simpla alklako de la ligilo "redaktu", kiu aperas sur ĉiu paĝo. Jen kial tiu ĉi projekto tiel rapide kreskis kaj plu kreskas: dekoj da miloj da homoj kunlaboras aldonante, korektante, plibonigante, kunligante la pli kaj pli vastan artikolaron.

La timo, ke libera ttt-ejo, kiun ĉiu ajn povas redakti, fariĝu kaoso, montriĝas senkiala: en la realo ĉiu intenca aŭ malintenca difekto de la komuna verko estas rapide korektita de atentemaj aliaj partoprenantoj.

Estas menciinde, ke la artikolo pri Esperanto ekzistas en 80 lingvoj de Vikipedio, el kiuj 7 estis elektitaj kiel elstaraj artikoloj, do, ili estas aparte bonkvalitaj kaj informplenaj artikoloj.

Pro ĉi ĉio Vikipedio povas signifoplene influi la impreson kaj ideon, kiun homoj ekhavas pri Esperanto. Vikipedio helpas Esperanton: esperantistoj kunhelpu por ke la esperantlingva Vikipedio ankoraŭ pliboniĝu kaj pliriĉiĝu.

**Respondoj al kritikoj**

Laikoj kreas ĝermojn kaj foje aldonas eraretojn, sed iom post iom fakuloj kaj spertuloj adaptas la kontribuojn kaj la artikoloj leviĝas al pli alta nivelo. Tute laŭ la ideo de liberfonta programado, konkludo estas ke "kun sufiĉe multe da okuloj, eraroj iĝas maloftaj".

Fine de 2005 aperis scienca studo de la fama revuo "Nature". En ĝi oni menciis ke en Vikipedio estas preskaŭ same (mal)multe da eraroj kiel en la plej aktuala eldono de Encyclopædia Britannica. La kvalito de la informoj estas komparebla. Tiu konkludo helpis pliseriozigi Vikipedion. Hodiaŭ daŭre multaj fakuloj opiniias Vikipedio ne serioza kiel fonto, ĉar ĉiu ajn povas ĝin ŝanĝi. Tamen, kiel bazo por esploroj ĝi

estas certe tre utila. Finfine plej ofte necesas kontroli la pravecon de asertoj en iu ajn verko.

Grava avantaĝo de Vikipedio por la averaĝe tre okupita esperantisto estas ke vi povas facile kontribui eĉ se vi havas nur malmulte da tempo. Vi vidas artikolon, klakas je “redaktu”, kaj tuj povas ŝanĝi ĝin. Se vi, ekzemple, administras retpaĝaron, tio ĉiam daŭras pli longe kaj pli komplikas.

Vikipedio konservas ĉiun ŝanĝon. Do, se iu fuŝas artikolon, eblas reveni al antaŭa versio. Oni povas alklaki “Historio” kaj vidi ĉiun version de la artikolo. Ankaŭ eblas alklaki “malsamoj” kaj vidi, kio ŝanĝiĝis en la paĝo.

Krome, ĉiuj rigardadas la paĝon “Lastaj Ŝanĝoj”, por ke stultaĵoj ne okazu. Se okazus, ne tro gravas. Vi estas avertata pri ĉiu ŝanĝo kiun oni faras al artikolo kiu troviĝas en via **Atentaro** (la listo de artikoloj kiujn vi atentas).


**Reklamo**




**Abonu Monato-n - www.monato.net**

**Filozofio de Vikipedio**

La iniciatinto de Vikipedio, Jimmy Wales, opinias ke la kono de la homaro apartenas al ĉiuj. Se vi kun li samopinias, gravas do ke tiu scio estu alirebla senpage de ĉiuj.

La granda malavantaĝo de paperaj enciklopedioj estas ke ili estas jam malĝisdataj kiam ili eldoniĝas. Interreta enciklopedio havas la avantaĝon de senlima amplekso kaj permanenta aktualeco. Kaj eblas rapidege retrovi informojn kompare al papera enciklopedio. Tion signifas "Wiki wiki" en la havaja lingvo : rapide, rapidege :-)

Ideo estas al kiel eble plej multaj homoj doni la eblecon redakti artikolojn, ilin aktualigi - kontribui per ilia kono. Kiam Vikipedio iĝis pli populara, pli kaj pli da homoj provis de ĝi profiti kaj/aŭ malbonintence ŝanĝi artikolojn. Pro tia vandalismo ekestis sistemo de administrantoj; homoj kiuj atentas pri la kvalito de la artikoloj.

Per speciala programaro oni kontrolas konstante je malbonintencaj ŝanĝoj kaj ekestas pli kaj pli da reguloj. Centoj da artikoloj estas protektataj, tiel ke ne simple iu ajn rajtas ilin redakti; ekzemple artikoloj pri prezidentoj, polemikaj temoj ktp. Ĝis nun ne ekestis bezono protekti paĝojn ene de la esperantlingva Vikipedio.

Danke al klara hierarkio, reguloj kaj proceduroj, Vikipedio maturiĝis por plukreski; por estonte daŭrigi kombini kvaliton kaj aktualecon kun la unikaj eblecoj de la interreto.

Vikipedio intertempe iĝis unu el la plej vizitataj retpaĝaroj de la tuta mondo. Estas potenciala minejo por havi enspezojn per reklamoj. Oni kalkulas ke se la multlingva Vikipedio estus komerca, ĝia valoro estus inter duonmiliardo kaj kvin miliardoj da usonaj dolaroj! Tamen, neniam la administrantaro de Vikipedio akceptis aperigi reklamojn. La mono por la serviloj kaj ĝiaj prizorgadoj venas de etaj kontribuoj de multaj individuoj. Por garantii la sendependecon.

Google, sen por tio peti ion ajn, ja favoras la rezultojn en Vikipedio. Oni diras ke la populareco venas ĉar Vikipedio koncentriĝas pri la enhavo kaj ke estas multaj ligiloj ene de Vikipedio kaj al Vikipedio de ekstere. La preskaŭ simbiota rilato inter Google kaj Vikipedio multe antaŭenigis kaj plipraktikigis la liberan interretan enciklopedion. Kun pli ol miliono da artikoloj la projekto klare atingis neatenditan sukcesegon kaj nun estas la plej vizitata nekomerca retejo en la tuta

mondo!

**Vikipedio kiel konservejo de artikoloj kaj fotoj**
En 2003 okazis Esperanto-renkontiĝo en Namur. Aktivulo verkis tiam ampleksan tekston en Esperanto pri la fama citadelo en tiu urbo. Se tiun tekston ni ne alŝutas al Vikipedio, kiu poste rememoros pri ĝi?

Imagu, post kvin jaroj esperantoparolantoj vizitos la citadelon kaj iu denove devus verki tekston… Ni disponigu niajn kreitaĵojn alŝutante artikolojn kaj fotojn al Vikipedio!

**Verki pri via regiono / kulturo**
Verkante pri via regiono kaj kulturo, vi disponigas tiun konon al la Esperantokomunumo. Se estas vizitantoj el aliaj landoj, ili povas legi pri la regiono kie vi loĝas; estas ne nur agrable por tiuj homoj, sed ankaŭ por vi mem, ĉar vi lernas pri la historio de via urbo kaj regiono, ekzercas Esperanton verkante kaj tradukante. Vi lernas ankaŭ pro la fakto ke aliaj kontribuantoj foje aldonas iom da informoj. Tio instigas vin al komparado kaj komunikado pri via elektita temo.

**Verki pri via fako**
Ne ĉiam estas facile trovi eldonejon por broŝuro aŭ libro pri fako en kiu vi spertas kaj pri kiu vi volas informi aliajn. Vikipedio povas esti bona, senpaga alternativo; ebleco strukture prezenti informojn al ekstera mondo.

**Estas amuze!**
Por multaj homoj, kontribui al Vikipedio estas amuza ŝatokupo. Oni verkas pri temo kiun oni ŝatas, ekscias pli pri ĝi kaj malkovras mirindaĵojn. Povas esti interesa alternativo al pasiva spektado de televido.

## Kial Vikipedio en Esperanto?

Vikipedio estas multlingva. En ĉiu aparta lingva fako verkadas homoj el la koncerna lingvo. En la esperantlingva vikipedio kunlaboras redaktantoj el la plej diversaj mondpartoj kiuj lernas iom post iom kunlabori en komuna projekto: tio estas unika spertado por ĉiuj partoprenantoj.

La anglalingva Vikipedio estas la plej ampleksa. Tamen en ĝi vi ne retrovos ĉion kaj - eble plej grave - vi trovos tie nur artikolojn laŭ vidpunkto de anglalingvanoj. Eĉ se vi bone regas la anglan, la vid- aŭ elirpunkto de la esperantistaro pri certa temo povas vere esti utila. Esperantistoj verkas kutime ne nur en alia stilo, sed ankaŭ pri iom

aliaj temoj ol la kutimaj. Vi trovos en la esperanta versio de Vikipedio ekzemple informojn pri Esperanto-renkontiĝoj, pri regionaj lingvoj kaj pri urbaj ĝemeliĝoj. Ne ĉiam en nacilingvaj Vikipedioj oni konsentus ke artikolo estas sufiĉe grava por troviĝi en enciklopedio - gravas ke informoj pri la esperantista kulturo, historio ktp. estu facile akireblaj de ĉiuj esperantistoj.

**Ekzerci Esperanton**
Vi povas verki pri via ŝatata temo kaj demandi al amiko / instruisto provlegi vian artikolon aŭ aldoni informojn al ĝi. Se vi ankoraŭ ne bone regas la lingvon, vi povas traduki el ĝi kaj tiel ekkoni Esperanton kaj ĝian kulturon.

**Montri al la mondo ke eblas ĉion esprimi per Esperanto**
Vikipedio estas pli kaj pli uzata. La interreta serĉilo Google favoras rezultojn en la enciklopedio, do ofte montras ilin plej supre inter la diversaj serĉrezultoj.

Se iu, ekzemple, serĉante artikolon pri sia plej ŝatata kantisto, rimarkas ĉe la artikolo ligilon al versio en Esperanto, li aŭ ŝi eble pro scivolemo alklakos tiun ligilon kaj ekinteresiĝos – almenaŭ oni konstatos ke la lingvo vere ekzistas kaj ke oni per ĝi povas ĉion esprimi.

Vikipedio pli kaj pli estas uzata ankaŭ profesie. Se krom la angla versio ankaŭ ekzistas franca, germana kaj esperanta, oni rimarkos tion. Gravas aldoni tial informojn pri, ekzemple, teknologiaĵoj.

**Normigo de la lingvo**
Se vi dubas pri vorto, indas kontroli kiun tradukon oni elektis en Vikipedio. Precipe povas esti interese kiam temas pri teknologiaj vortoj. Se mankas vorto, certe indas ĝin aldoni. Eblas diskuti pri artikoloj; pli pri tio vi legos en la ĉapitro pri la Vikipedia komunumo.

**Vikipedio kiel informilo pri Esperanto en nacilingvaj versioj**
En Vikipedio ekzistas Esperanto-portalo en diversaj lingvoj. Tiuj portaloj donas superrigardon de ĉiuj artikoloj ene de Vikipedio, en la koncerna lingvo, pri la internacia lingvo. Estas tie artikoloj ne nur pri la historio de Esperanto kaj pri Zamenhof mem, sed ankaŭ pri Esperantoliteraturo, -renkontiĝoj, -muziko, ktp.

De la nederlandlingva portalo ekzistas mallonga plusenda adreso, http://www.esperanto.be/wiki. Povas esti tre efika varbilo.

# Kial kunlabori al Vikipedio?


## Portaal:Esperanto

Welkom bij het portaal over de internationale taal Esperanto. U vindt hier een overzicht van artikels over de geschiedenis en de cultuur van het Esperanto in Wikipedia.

Dit portaal is een subportaal van Portaal:Taal.

Artikels over het Esperanto - Leer Esperanto

**Afbeelding van de maand**



**Esperantoverenigingen**
in de Benelux en een deel van Duitsland.

**Overzicht van de Esperantocultuur**

**Esperantomuziek** Zie artikel: Esperantomuziek

Muzikanten die in het Esperanto zingen komen van over de hele wereld en de muziek bestaat in alle genres. Een aantal bekende groepen zijn

- Akordo (van middeleeuws tot modern, van volksmuziek tot popmuziek, Nederland)
- Dolchamar (hiphop, Finland)
- Esperanto Desperado ("ritmisch/humoristisch", Denemarken)
- JoMo (rock, Frankrijk)
- Ĵomart kaj Nataŝa (volksmuziek, Kazachstan)
- Kaj Tiel Plu (volksmuziek, Catalonië)
- Kajto (volksmuziek, Nederland)
- Krio de Morto (hardrock, Polen)
- Merlin (pop-rock, Brazilië)
- Ralph Glomp (schlagermuziek, Duitsland)
- Radikulo (blues, Verenigde Staten)

**Literatuur en schrijvers**

Zie artikel: Esperantoliteratuur

Zie artikel: Lijst van Esperanto-auteurs

Er bestaat relatief veel vertaalde en ook originele literatuur in het Esperanto; meer dan over het algemeen wordt verwacht. Daarnaast zijn er o.a. ook gedichten in deze taal, literaire scholen en zelfs Esperantostrips.

**Romanschrijvers:** Julio Baghy - Raymond Schwartz
**Poëten:** William Auld - Antoni Grabowski - Kálmán Kalocsay
**Ideologen:** **Claude Piron** (essaies, pedagogie) - Eugène Lanti -
**Andere:** Gaston Waringhien (taalkundige) - Marjorie Boulton

**Esperantobijeenkomsten**

Fine de la jaro 2006 ekzistas la portalo en la lingvoj angla, Esperanto, franca, nederlanda kaj portugala. Se via gepatra lingvo ne estas inter tiuj ĉi, konsideru krei la portalon, eventuale helpata de sperta vikipedi-isto. Se jes ja vi ĝin retrovas, ne hezitu kontribui!

Eblas aldoni informojn pri nia lingvo al la portalo Lingvo en via gepatra lingvo. En la nederlanda Vikipedio absolute ne eblas ne informiĝi pri Esperanto se vi iom serĉetas informojn pri lingvoj…

| KUNSTTALEN | OVERZICHTEN |
|---|---|
| Een **kunsttaal** is een taal die in tegenstelling tot etnische talen niet historisch is gegroeid als onderdeel van een cultuur, maar is ontworpen door één persoon of een kleine groep personen. Er zijn meer dan duizend kunsttalen bekend, die kunnen worden onderverdeeld in diverse soorten en zijn gemaakt om diverse redenen: sommige stellen zich ten doel als cultureel onbeladen taal de communicatie tussen de volken te bevorderen, andere dienen ter illustratie van een fictief land, weer andere zijn uitsluitend gemaakt voor het eigen plezier van de maker.<br><br>Van alle kunsttalen is het Esperanto wereldwijd de meest gebruikte. | ▪ Artistieke taal<br>▪ Fictieve taal<br>▪ Internationale hulptaal<br>▪ Logische taal<br>▪ Lijst van kunsttalen<br>▪ Esperanto |

**1 - Enciklopedia**
Vikipedio estas enciklopedio kaj la stilo devas esti tia. Vikipedio ne estas vortaro (malkiel Wiktionary.org), nek gvidlibro pri vojaĝado (malkiel Wikitravel.org). Ankaŭ ne rajtas aperi reklamo por varoj.

Ĉu certaj temoj jes aŭ ne estas sufiĉe gravaj por aperi en enciklopedio, tion decidas la vikipedia komunumo mem. Foje ekzemple certa persono aŭ temo estas grava en Esperantio, sed ne sufiĉe grava por aperi en alilingva Vikipedio.

Regule estas diskutoj ĉu al certa temo dediĉi apartan artikolon aŭ inkluzivi ĝin en jam ekzistanta artikolo kiel sekcio.

**2 - Neŭtrala vidpunkto**
La neŭtrala vidpunkto estas la plej grava kondutmaniero por kontribuantoj de Vikipedio.

**Kiel:** Por verki artikolon laŭ neŭtrala vidpunkto, vi verku laŭeble sen partiemeco. Vi verku pri faktoj aŭ pri faktoj pri opinioj, sed ne asertu opinion kiel fakton. “Ni volas havi pli ol 100.000 artikolojn” estas opinio, estas aserto disputita, sed “Iuj deziras, ke la projekto grandiĝu” estas fakto, estas aserto nedisputita. “La blanka raso estas la mastra raso” estas opinio, sed “Hitlero diris, ke la arjoj estas la mastra raso” estas fakto.

* fakto: aserto ne grave disputata
* opinio: aserto disputata

**Kial:** Vikipedio estas kunlaboro de multaj homoj tra la mondo de diversaj kredoj, ideologioj kaj opinioj pasiaj. Tial Vikipedio ne povas teni aŭ prediki iun ajn ideologion.

Kiel homoj, ni kredas kaj opinias, ofte pasie, sed kiel vikipediistoj (kaj kiel ĝentiluloj), ni devas adopti vidpunkton neŭtralan. Se ne, Vikipedio fariĝos senĉesa milito inter redaktantoj kaj tio forlogos multajn legantojn kaj kontribuantojn.

Vikipedio estas resumo de la nuna stato de homa scio. Sed scio ne estas kredo aŭ opinio. Scio estas aro de faktoj. Rilate al la neŭtrala vidpunkto, ni difinas fakton kaj opinion kiel: “La Tero iras ĉirkaŭ la Suno”, ekzemple, nun estas fakto. Sed en 1600 ĝi ne estis fakto, sed

nur opinio. Ĉar la aserto tiam estis disputita. Tio estas la naturo de homa scio.

Homa scio kreskas, disvolviĝas. Fakto hieraŭa estas opinio hodiaŭa kaj fabelo morgaŭa. Aŭ inverse. Homa scio estas laboro progresanta kaj maturiĝanta. Scio ne estas vero: scio estas la vojo, vero la celo.

**Ekzemplo:** la artikolo pri Jesuo Kristo. Ĝi rakontas la faktojn pri Jesuo -- la asertoj ne grave disputitaj pri li -- kaj tiam ĝi priskribas la diversajn opiniojn pri li -- ne kiel faktoj, sed kiel kredoj atribuitaj al diversaj grupoj: kristanoj, gnostikoj, judoj, islamanoj, ktp. "Jesuo estas la Filo de Dio" estas opinio, sed "Kristanoj kredas, ke Jesuo estas la Filo de Dio" estas fakto.

Tia estas la maniero de la neŭtrala vidpunkto. Kaj tia estas ankaŭ la maniero de bona filozofo aŭ profesoro: priskribi senpartie laŭeble la diversajn flankojn de ideo aŭ disputo. Tio estas necesa por bona komreno kaj bona penso. Kaj, por ni, tio estas necesa por bona Vikipedio.

Se vi trovas neneŭtralan artikolon, sed ne sentas vin kapabla forigi la neneŭtralecon, aldonu {{neneŭtrala}} supre en la paĝo, por ke aperu la ŝablono pri neneŭtraleco, tiel ke aliaj estos avertitaj kaj baldaŭ iu plibonigos la artikolon.

**3 - Libera, laŭ GFDL**

GNU estas permesilo kreita kun la celo krei kompletan liberan operaciumon. Por dokumentoj oni kreis GFDL (GNU Free Documentation License - GNU Libera Permesilo por Dokumentoj).



Ĉiu kunlaboranto de Vikipedio konsentu kun la GFDL-permesilo. Koncize tio signifas ke ĉiu materialo kiun vi aldonas al Vikipedio (ĉu teksto, ĉu bildoj, ĉu sonoj) rajtas esti uzataj de aliaj personoj senpage, kondiĉe ke li aŭ ŝi mencias la fonton kaj la permesilon.

Grava sinsekvo de tio estas ke vi ne rajtas aldoni materialon al Vikipedio kiu estas kopirajtita. Gravas ankaŭ, precipe (sed ne nur) rilate bildojn, mencii la fonton: ĉu vi mem fotis, se ne kiu estas la aŭtoro

ktp.

Por multaj aŭtoroj la libereco de Vikipedio estas unu el la ĉefaj kialoj por kunlabori.

**4 - Respekta**

Kunlaborantoj al Vikipedio venas de diversaj regionoj, landoj kaj kulturoj. Tial foje povas ekzisti pri certa temo malsama vidpunkto aŭ miskompreno.

Reciproka respekto estas ŝlosilo al interkompreno. Gravas en Vikipedio ne persone ataki homojn, sed respekti la opinion de aliaj samkiel en akademiaj rondoj.

Novuloj estas ofte tre entuziasmaj, sed ankoraŭ ne bone konas la regulojn de Vikipedio. Ilin ne seniluziigu per riproĉoj pro erar(et)o, sed kredu pri bonaj intencoj - helpu kaj asistu por ke ili ekkomprenu la funkciadon de libera enciklopedio kaj daŭrigu la kunlaboradon.

**Reklamo**

EKLABORU!

la retejo por serĉi laboron aŭ laboranton!

**www.eklaboru.com**

# Kiel redakti paĝon - praktike kunredakti

**Elstaraj artikoloj**
Por iom esplori Vikipedion antaŭ ol ekkontribui, la listo de elstaraj artikoloj estas bona loko. Ligilon al ĝi vi trovos ĉe la ĉefpaĝo de Vikipedio.


**La unuaj provoj**
Estas tre facile redakti vikian paĝon. Mi konsilas por unua provo redakteti ekzistantan paĝon.

Tajpu en via retumilo la retadreson **http://eo.wikipedia.org**. Sub "serĉu", vi tapju ŝlosilvorton pri temo kiu interesas vin. Se vi tuj volas iri al la artikolo pri tiu temo, alklaku "Ek!" Se ne, alklaku "Serĉu". Malfermiĝos paĝo kun artikoloj en kiuj via ŝlosilvorto estas uzata.




Se, ekzemple vi elektis kiel ŝlosilvorton "Varsovio" kaj poste alklakis "Ek!", vi alvenos je la paĝo "Redaktante Varsovio".


Klaku je "redaktu" por redakti la paĝon. Aperas la kodo. En ĝi vi povas simple tajpi por ŝanĝi ĝin. Povas aspekti iom timige en la komenco, mi devas konfesi.




Komence de paĝo foje aperas strangaj kodoj por ŝablono, bildo, ktp. Sed, se vi iom subeniras, aspektas jam multe pli "normala" la teksto... Vi povas tiun libere adapti / pliampleksigi / korekti.

Post kiam vi finis adapti la tekston, vi povas alklaki "Antaŭrigardu" por kontroli ĉu via adapto aspektas bone. Nur kiam vi poste klakos al "Konservu ŝanĝojn", viaj adaptoj estos akceptitaj.

Prefere ĉe "Resumo" ĉiam mallonge informu kion vi adaptis je la artikolo.




## Specialaj signoj

Dank' al la ĉefprogramisto de la tutmonda Vikipedio, Brion Vibber, esperantisto, la esperantlingva Vikipedio enhavas tre facilan sistemon por entajpi la esperantajn supersignojn. Se vi skribas laŭ la X-sistemo, aŭtomate ĉiu vorto kun ĉapelo estas konvertita al ĝusta skribmaniero. Tajpu do "cxirkauxajxo" se vi celas "ĉirkaŭaĵo". Se vi preferas, eblas tamen ankaŭ uzi la programeton EK! (nur per Vindozo) aŭ unikodan redaktilon kia Unired por tajpi la supersignojn. Vi povas eĉ libere kombini la du sistemojn.

Por iuj specialaj signoj vi havas la eblecon aŭtomate enmeti ilin el redaktilo kiu aperas sub la redaktofenestro. Tie ankaŭ troviĝas utilaj kodoj por vikiredaktado post "Vikisintakso". Vi povas ilin aldoni al via teksto simple alklakante.

## Kiel redakti paĝon - praktike kunredakti

**La provejo**
La provejo ĉe http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Provejo estas por redaktaj eksperimentoj. Vi estas libera uzi novajn formatojn tie ĉi, kie neniu krios al vi ĉar vi kaosigis ĉion. Post la kreado de la teksto vi povas konservi ŝanĝojn aŭ antaŭrigardi sen konservi ilin.

**Se al vi plaĉas la redaktado...**
vi povas krei konton. Tia konto donas al vi plurajn avantaĝojn:

* Aliaj agnoskos viajn redaktojn kiel viajn, anstataŭ kiel sennomajn.
* Vi povas aldoni artikolojn al via "atentaro". Kiam iu ŝanĝas paĝon, kiun vi "priatentas", vi facile vidos ke tio okazis.
* Vi havas tutan liston de "miaj kontribuoj", kiu facile montras ĉiujn viajn redaktojn.
* Vi havas paĝon pri vi, kie vi povas doni biografian informon legeblan de aliaj uzantoj, por ke ĉiuj vikipediistoj pli bone konu unu la alian.
* Vi havas diskutpaĝon kie aliaj uzantoj povas lasi al vi mesaĝon.
* Kiam estas nova mesaĝo, vi estas pri tio informita per okulfrapa oranĝkolora strio kiu montriĝas en la supro de ĉiuj paĝoj de la projekto ĝis kiam vi aliris vian diskutpaĝon.
* Helpas ĉiujn se ni scias kiu faras kion, anstataŭ ke multaj ŝanĝoj estas de sennomuloj.


**Kiel krei konton?**
Dekstre, supre, alklaku la ligilon "Ensalutu". Poste vi povas krei ĝin klakante je "kreu konton". Sufiĉas elekti uzantonomon, pasvorton, mencii retpoŝtan adreson kaj… ek al la verkado!

**Verki novan artikolon...**
vi povas fari laŭ diversaj manieroj. Mi konsilas komenci per traduko de artikolo kiu ekzistas en via gepatra lingvo. Sekvu ekzemple la jenajn paŝojn:

1 - Serĉu artikolon kiu ekzistas en via gepatra lingvo, sed ankoraŭ ne en Esperanto. Por tio iru al nacilingva Vikipedio (ekzemple http://nl.wikipedia.org aŭ http://pl.wikipedia.org) kaj tajpu ŝlosilvorton por serĉi artikolon. Ekzemple pri "laŭtparolilo" vi povus ekserĉi. Jam ekzistas artikolo en Esperanto… Tion vi povas konstati sube de la paĝo maldekstre ĉe "aliaj lingvoj".


Se, finfine, vi trovis artikolon kiu ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto,

vi povas krei ĝin en la esperantlingva Vikipedio.
2 - Tajpu ŝlosilvorton sub “serĉu”, ekzemple “Wimbeldon” kaj alklaku “Ek!”. Aperos mesaĝo ke la artikolo ankoraŭ ne ekzistas.




3 - Alklaku la ligilon “Kreu la artikolon”.
4 - Redaktu la artikolon.
5 - Alklaku “Antaŭrigardu” por kontroli la rezulton.
6 - Se la rezulto al vi plaĉas, alklaku “Konservu”.

Jen ĉio!

**Konsiloj por redaktantoj**
Artikolon konsistigas minimume tri kompletaj frazoj, tri ligiloj al aliaj artikoloj, kaj - se eblas - unu intervikia ligilo.

La unua frazo ĉiam estas kompleta frazo kaj enhavas la plej esenca(j)n informo(j)n por enkonduki la temon. Transpreno de informoj el aliaj (nevikiaj) tekstoj okazas aŭ kiel citaĵo kun fontindiko aŭ en redono per propraj vortoj. En la malofta kazo, ke temas pri originala, nova penso trovebla nur en unu fonto, nepre per citaĵo.

Familiajn nomojn oni skribu per majuskloj nur unufoje komence de la artikolo. En la titolo kaj la cetero de la artikolo oni uzu minusklojn, same kiel en aliaj lingvoj.

**Uzi kodojn**
Por redakti paĝon, vi povas uzi la ilaron supre de la redakta fenestro.



## Kiel redakti paĝon - praktike kunredakti

Ĝi helpas al vi aldoni kodon al paĝo kiun vi redaktas. Tiun kodon vi povas ankaŭ mem tajpi aŭ kopii de alia artikolo.

En la ĉi-apuda kadro aperas kelkaj bazaj kodoj. Dekstre aperas la kodo, maldekstre la rezulto.

**Redaktokonflikto**
Redaktokonflikto okazas kiam unu redaktanto provas konservi siajn ŝanĝojn post kiam dua kiu estas malferminta la saman artikolon por redakti ĝin jam konservis la siajn. Tiam la lasta kiu provas konservi siajn ŝanĝojn vidas du redaktofenestrojn : unu kun la ŝanĝoj de la alia redaktinto jam konservitaj kaj alia kun siaj propraj ŝanĝoj.

Tiukaze tiu lasta ricevas jenan mesaĝon : "Iu alia ŝanĝis la paĝon post kiam vi ekredaktis. La supra tekstujo enhavas la aktualan tekston de la artikolo. Viaj ŝanĝoj estas en la malsupra tekstujo. Vi devas mem kunfandi viajn ŝanĝojn kaj la jaman tekston. Nur la teksto en la supra tekstujo estos konservita kiam vi alklakos "Konservu"."

Por eviti ĉi problemon kiam vi deziras funde redakti artikolon, komencu redakti enmetante en la supro de la redaktota paĝo la ŝablonon {{Redaktas}}. Uzu la jenan sintakson kiel bazon:

```
{{redaktas
|redaktanto=Via vikipediista nomo
|subskribo=Via subskribo
|komenco=redaktokomenco
|fino=redaktofino
|dauro=redaktodaŭro}}
```

Supre de la artikolo tiam aperos jena (ekzempla) avertomesaĝo.


**Atentu:** Mi nun prilaboras tiun ĉi artikolon defundamente de la **10-a de majo 2007**. Por eviti la riskon de redaktokonflikto, mi petas vin ne redakti la artikolon dum unu semajno, ĝis la malapero de tiu ĉi avertomesaĝo, tio estas je la **17-a de majo 2007**. Dankas Ludoviko Zamenhof.

Ne forgesu forigi ĝin kiam vi finredaktis!

<table>
<tr><td>Iigilo al la paĝo Oftaj Demandoj.</td><td>Iigilo al la paĝo [[Oftaj Demandoj]].</td></tr>
<tr><td>Sama loko, malsama nomo:<br>Legu oftajn demandojn.<br>Titoloj povas havi nur literojn kaj spacojn!</td><td>Sama loko, malsama nomo:<br>Legu [[Oftaj Demandoj|oftajn demandojn]]</td></tr>
<tr><td>Por ligilo al aliaj paĝoj,<br>enmetu ties retadreson: http://www.nupedia.com.</td><td>Por ligilo al aliaj paĝoj,<br>enmetu ties retadreson: http://www.nupedia.com.</td></tr>
<tr><td>emfazete (kutime kursive),<br>emfaze (kutime grase),<br>emfazege (kutime kursive kaj grase).<br>Uzu tion ankaŭ en formuloj:<br>F = m a.</td><td>''emfazete (kutime kursive)'',<br>'''emfaze (kutime grase)''',<br>'''''emfazege (kutime kursive kaj grase)'''''.<br><br>'''F''' = ''m'' '''a'''.</td></tr>
<tr><td>Esperantaj literoj:<br>ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ<br>Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ<br><br>aux</td><td>cx gx hx jx sx ux<br>Cx Gx Hx Jx Sx Ux<br><br>auxx</td></tr>
</table>

<table>
<tr><td>Nova Sekcio<br>Subsekcio<br>Sub-Subsekcio</td><td>== Nova Sekcio ==<br>=== Subsekcio ===<br>==== Sub-Subsekcio ====</td></tr>
<tr><td>▪ Listoj estas bonaj:<br>  ▪ ili organizas materialon<br>  ▪ ili aspektas puraj</td><td>* Listoj estas bonaj:<br>** ili organizas materialon<br>** ili aspektas puraj</td></tr>
<tr><td>1. Ankaŭ numeritaj listoj estas bonaj<br>  1. Tre organizitaj<br>  2. facile legeblaj</td><td># Ankaŭ numeritaj listoj estas bonaj<br>## Tre organizitaj<br>## facile legeblaj</td></tr>
<tr><td>Se vi volas miksi diversajn specojn de listoj, agu tiel:<br>1. Numerita listo:<br>  ▪ unua ero<br>  ▪ dua ero<br>2. Pli da listeroj</td><td># Numerita listo:<br>#* unua ero<br>#* dua ero<br># Pli da listeroj</td></tr>
<tr><td>Liniojn vi povas<br>  deŝovi<br>    tra kelkaj niveloj</td><td>:Liniojn vi povas<br>::deŝovi<br>:::tra kelkaj niveloj</td></tr>
</table>

# Bildoj

### Alŝuti

Ne eblas uzi bildojn de eksteraj retpaĝaroj en Vikipedio. Estas du eblecoj: aŭ vi alŝutas bildon al Wikimedia, aŭ al aparta vikiprojekto kiel Vikipedio (ĉiu lingvo aparte). Se vi volas uzi la bildon en alilingvaj artikoloj aŭ en alia viki-projekto, nepre elektu alŝuti ĝin al Wikimedia. Se ne, vi povas ĝin alŝuti nur al la esperantlingva Vikipedio.
Alŝuti bildojn eblas ĉe http://commons.wikimedia.org/ aŭ ĉe http://www.vikipedio.org klakante "Alŝutu dosieron" maldekstre en la menuo. Aperos formularo per kiu vi povos alŝuti novajn bildojn kaj aliajn dosierojn por ilustri artikolojn.

Ĉe kutimaj retumiloj, vi vidos sube ligilon "Foliumi…" aŭ simile; tiu malfermas la dosier-elektilon de via operaciumo. Kiam vi elektos dosieron, ĝia nomo plenigos la tekstujon apud la butono.

Vi ankaŭ nepre devas klakjesi la skatolon por aserti, ke vi ne malobeas la leĝan kopirajton de aliuloj per alŝuto de la dosiero. Por plenumi la alŝutadon, alklaku la ligilon "Alŝutu". Tio ĉi eble iomete longe daŭros, se estas granda dosiero kaj se via interreta konekto malrapidas.

La dosiertipoj preferataj ĉe Vikipedio estas JPEG por fotografaĵoj, PNG por grafikaĵoj, diagramoj, ktp; kaj OGG por sonregistraĵoj. Bonvolu doni al via dosiero nomon informan, por eviti konfuzon.

### Uzi bildon en artikolo

En la artikolo vi povas aldoni, ekzemple, la bildojn per la jena kodo :
[[Dosiero:VerdaStelo.png]]

Se vi volas indiki la grandecon kaj lokon en la paĝo, uzu la jenan kodon kiel bazo: [[Dosiero:Sedno.jpg|200px|thumb|left|Arto de Sedno]]

# Kopirajto

TRE gravas mencii ĉe alŝutota bildo la kopirajtajn informojn. Ekzistas amaso da ili en la anglalingva Vikipedio kaj en Wikimedia. Se vi alŝutas al la (malpli severa) esperantlingva Vikipedio, ekzistas ĉefe tri uzeblaj ŝablonoj {{PD}}, {{proprafoto}} kaj {{Justa Uzo}}.

*Tiu ĉi bildo estas publika havaĵo. Je ĝi ne estas kopirajto, ĉu ĉar la bildo estas malnova, ĉu ĉar la kopirajto-posedanto konsentas, ĉu ĉar ne eblas ĝin kopirajtigi. Tio ĉi validas tutmonde.*

**Tiun ĉi foton aŭ bildon mi kiel VIKIPEDIO La libera enciklopedio -volontulo mem kreis**

Alŝutante la dosieron, mi konsentas ĝin donaci sub la kondiĉoj menciataj en la Libera Dokumenta Licenco GFDL.

For other languages read here

Tio estas kopirajtita bildo. Sub la kondiĉo, ke ĝia fonto estas klare difinita, ĝia uzo ĉi tie estas konsiderata justa konforme al la usona leĝaro ĉar:

- Ĝi bildigas la pritraktitan subjekton kaj ne celas ian ajn komercan uzon.
- Ĝi troviĝas enkadre de esperanta vikipedio, kiu situas sur usonaj serviloj.
- Ĝi ne malhelpas al la posendanto de kopirajto plenrajte profiti pro sia verko.
- Ne ekzistas analogia bildo sub GFDL. Se ĝi aperas, bonvolu anstataŭi tiun ĉi bildon per la nekopirajtita.

ATENTU: Ajna alia uzo de tiu ĉi bildo, en vikipedio aŭ aliloke, povas esti malrespekto de kopirajto.

Ju pli da informoj vi aldonas (pri aŭtoro, dato, ktp), des pli bone. Se vi volas alŝuti la bildon al Wikimedia, oni konsilas uzi anglan lingvon por la kopirajto-informoj. Se vi volas, vi povas aldoni tradukojn. Uzu ekzemple la jenan ŝablonon por aldoni informojn pri la alŝutita bildo:

```
100 jaar Gentse tram

{{Information|
|Description= Ghent tram
|Source= picture I took myself
|Date= june 2005
|Author=Yves Nevelsteen
|Permission=GFDL
}}

{{GFDL}}

[[Category:Trams in Ghent]]
```

**Kopiado "el" la Vikipedio**

La celo de la Vikipedio estas krei libere alireblan informfonton en la formo de enciklopedio. Ĉiu uzanto rajtas libere kopii, modifi kaj distribui ajnajn partojn de la enhavo de Vikipedio, kondiĉe ke tiu uzanto: 1 - donas al '"siaj"' uzantoj la samajn rajtojn sub la permesilo [[GFDL]]
2 - informas siajn uzantojn, ke Vikipedio estas uzita kiel fonto de la citaĵoj, kaj

3 - donas al siaj uzantoj aliron al la vikipedia fonto mem (aŭ kiel ligilon, aŭ kiel kopion de la tuta vikiteksto).

**Kopiado "al" la Vikipedio**
Kontribuante artikolon al la Vikipedio, vi permesas, ke via artikolo estu eldonata sub la permesilo GFDL. Por rajti permesi tion, necesas ke:
1 - vi estas tiu, kiu posedas la eldonrajton por tiu verko, aŭ
2 - vi prenis la materialon de fonto kiu permesas eldonadon sub GFDL, t.e. eldonaĵo jam sub GFDL aŭ materialo kiu estas tute sen kopirajto (ekzemple ĉar la aĝlimo por kopirajto estas jam trafita).

## Kategorioj

Grupigu artikolojn en kategoriojn se tiaj kategorioj povas esti utilaj por legantoj de tiuj artikoloj. Por la artikolo pri "Tokipono" utila kategorio povus esti [[Kategorio:Planlingvoj]]. Neutila kategorio povus esti [[Kategorio:Lingvoj kiuj komenciĝas per la litero T]] :-)

En la komenco estas plej facile konsulti similan artikolon kiel tiu kiun vi verkis, por kompari en kiu kategorio tiu aperas.

**Kiel aldoni kategorion kaj enmeti paĝon en kategorion**
Kategoriojn oni aldonas sube de redaktitaj paĝoj. Aldonu kategorion sube de la artikolo per la jena kodo: [[Kategorio:Kategoria Nomo]]

Aŭtomate aldoniĝos la artikolo al aparta superrigarda kategorio-paĝo.

**Ordigaj ŝlosiloj**
La supra simpla regulo tamen ne validas ĉiam. Se oni aldonus en la artikolo "Peter Paul Rubens" simple la kategorion [[Kategorio:Flandraj pentristoj]], tiam Rubens en la indeksoj ne aperus sub R, sed sub P, la unua litero de Peter. Por eviti tion, oni aldonu ordigan ŝlosilon en la jena formo:

[[Kategorio:Flandraj pentristoj|Rubens, Peter Paul]]

**Ŝablonoj**
Tre oportune estas uzado de ŝablonoj kiuj povas plibeligi artikolojn kaj provizi diversajn ligilojn al artikoloj ĉirkaŭ la paĝa temo. Ekzemple en la artikolo pri Varsovio sufiĉas aldoni sube de paĝo tiun ĉi kodon:

{{Pollando}}

Por havi la ĉi-suban rezulton.




Ĉiuj substrekitaj nomoj estas ligiloj al koncernaj artikoloj (kelkaj ekzistantaj, kelkaj aldonindaj).

**Aliaj ekzemplaj ŝablonoj**
Ekzistas multaj ŝablonoj utilaj por la tenado de la projekto, precipe informiloj celante la aliajn redaktantojn kaj la legantojn.

{{ĝermo}} pro "ĝerma" t.e. ankoraŭ tre baza artikolo.
{{ĝermo-lingvo}} Ĝermoj pri lingvaj temoj.
{{ĝermo-esperanto}} Ĝermoj pri Esperantaj temoj.
{{ĝermo-komputiko}} Ĝermoj pri komputikaj temoj.
{{Redaktas}} se vi volas eviti ke iu alia samtempe verku
{{Apartigilo}} se estas termino kiu havas pli ol unu signifon
{{Forigu}} se vi volas ke oni forigu la artikolon.

## Ceteraj sciindaĵoj

**Intervikio**
Ankaŭ sube, sed maldekstre ekster la artikolo, aperas ligiloj al la sama artikolo en alia lingvo. Vi povas aldoni tian ligilon per jena ekzempla kodo:

[[en:Guy Verhofstadt]]
[[fr:Guy Verhofstadt]]

("en" estas mallongigo de English - angla, "fr" de Français - franca)

Ofte, por ŝpari tempon, vi povas kopii tian kodon el alilingva artikolo. Gravas, se ekzistas la artikolo ankaŭ en alia lingvo, ankaŭ en la artikolo en tiu lingvo aldoni la interviki-ligilojn al la esperantlingva artikolo. Poste robotoj aŭtomate aldonos la ligilojn al eventualaj artikoloj en aliaj lingvoj.

### Ŝanĝi la titolon de artikolo

Vi povas ŝanĝi la nomon de iu paĝo, kunportante ĝian historion de redaktoj je la nova nomo, ekzemple se estas eraro en la skribmaniero. Klaku supre de la artikolo je "Renomu" por tio. Ne faru tion ĉi tro rapide. Krom se temas pri evidenta eraro, indas unue diskuti ĉu jes aŭ ne fari la ŝanĝon antaŭ ol efektivigi ĝin.

La antaŭa titolo fariĝos alidirektilo al la nova titolo. Ligiloj al la antaŭa titolo ne estos ŝanĝitaj; uzu la riparilojn kaj zorgilojn ĉe "Specialaj Paĝoj" por certigi, ke ne restos duoblaj aŭ fuŝitaj alidirektiloj. Kiel renomanto, vi respondecas pri ĝustigado de fuŝitaj ligiloj.

Notu, ke la paĝo ne estos renomita se jam ekzistas paĝo ĉe la nova titolo, krom se ĝi estas malplena aŭ alidirektilo al ĉi tiu paĝo, kaj sen antaŭa redaktohistorio. Pro tio, vi ja povos removi la paĝon je la antaŭa titolo se vi mistajpus, kaj neeblas ke vi neintence forviŝus ekzistantan paĝon per movo.

### Alidirekti artikolon

Foje okazas ke pluraj nomoj taŭgus kiel titolo por artikolo. Tiam oni povas krei alidirektilon de unu versio al alia.

Povas esti ke ekzistas diversaj skribmanieroj, ekzemple por Białystok. Ĉar en nepola klavaro mankas la pola ł, estas konsilinda aldoni ligilon de Bialystok al Białystok.

Vi unue konservu la tekston de la forigenda paĝo ie, kaj redaktu la alian paĝon por enmeti ĉiujn informojn kiuj estis en la forigota paĝo sed ne en la restonta alidirekta paĝo.


Tiam, por fari alidirektan paĝon el la forigota artikolo, metu ĉi tian tekston en ĝin: #REDIRECT [[Nomo de alia artikolo]]

Vi ankaŭ povas uzi alidirektilojn por:
* Mallongigoj, ekz. ELNA alidirektas al Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
* Alternaj nomoj
* Misliterumoj
* Rilataj vortoj, kiuj ne indas propran artikolon, alidirektas al plena artikolo


Alidirekti artikolon povas ankaŭ esti tre utila se vi volas mencii

ligilon en artikolo en revuo. Eblas mencii por la artikolo http://eo.wikipedia.org/wiki/Białystok kiel ligilo http://www.vikipedio.org/wiki/Bialystok.

**Atentigi pri artikolo**
Se vi opinias ke artikolo ne estas sufiĉe bona por aperi en Vikipedio aŭ se vi rimarkas "vandalismon", vi povas supre de la artikolo aldoni la ŝablonon {{forigu}}. Aperos la jena teksto:


Oni petas forigi ĉi tiun artikolon pri ***"Mamuloj"***, ĉar ĝi ne konvenas al la Regularo, skizita ĉe Vikipedio:Forigendaj artikoloj. Se vi oponas ĉi tiun peton, bonvolu komenti ĉe Vikipedio:Forigendaj artikoloj.


Eblas ankaŭ sugesti plibonigi la artikolon per ŝablono {{plibonigu}}


Ĉi tiu artikolo montras stilajn aŭ/kaj gramatikajn aŭ/kaj strukturajn problemojn kaj bezonas **poluradon** por konformi al pli bona nivelo de kvalito.

kunigi la artikolon kun dua artikolo per ŝablono {{kunigu}}


Oni sugestas kunigi ĉi tiun artikolon kun *nomo de artikolo*. (Diskuto)

plu-ellabori la artikolon per ŝablono {{ĝermeto}}


Ĉi tiu artikolo estas **Ĝermeto**: artikolo kiu ne atingas la minimuman nivelon de **ĝermo**. Ĝermo enhavu almenaŭ tri plenajn frazojn kaj unu ligilon.
Se ĝi ne pliboniĝas baldaŭ, eble oni forigos ĝin.

Nur administrantoj rajtas vere forigi la artikolon.

**Reiri al antaŭa versio de artikolo**
Se iu adaptis artikolon, kaj vi ne konsentas kun la adaptoj, eblas remeti antaŭan version de ĝi. Tiucele klaku sur "Historio" supre de la artikolo. Se vi elektas certan version, vi povas vidi kion konkrete oni adaptis klakante sur "Komparu la elektitajn versiojn".

Poste vi povas klaki je "Redaktu" ĉe la malnova versio kaj re-konservi ĝin. Aperos la jena averto:

"AVERTO: Vi nun redaktas malnovan version de tiu ĉi artikolo. Se vi konservos vian redakton, ĉiuj ŝanĝoj faritaj post tiu versio perdi-ĝos."

## La vikipedia komunumo

**Administrantoj**
Administrantoj estas uzantoj al kiuj oni permesis aliron al iuj limigitaj funkcioj, ĉar ili estas konsiderataj fidindaj. La administrantoj ne havas super la aliaj uzantoj iun ajn povon, krom tio, ke ili estas komisiitaj efektivigi iujn decidojn, kiujn faris la tuta komunumo.

La komumuno ja lasas la administrantojn fari gravajn bontenadajn laborojn, kiuj postulas tiujn kelkajn aldonajn funkciojn, kiuj estas al la administrantoj permesitaj. Al tiuj laboroj apartenas ekz. observado de balotado pri forviŝo de paĝoj, kontrolado de novaj kaj de ŝanĝitaj paĝoj kaj forviŝado de evidenta vandalismo kaj helpo al uzantoj kun problemoj, kies solvadon postulas la administrantaj rajtoj. Ĉar la administrantoj estas jam spertaj uzantoj, la ceteraj vikipediistoj postulantaj helpon aŭ konsilon ofte turniĝas ĝuste al la administrantoj.

Administranto estas vikipediisto delegita kun kelkaj povetoj por glatigi la funkciadon de la vikio:
* Forigado de fuŝkreitaj paĝoj
* Restarigo de misforigitaj paĝoj
* Forbarado de IP-adresoj de vandaloj
* Protekti certajn paĝojn (tiam nur administrantoj rajtas redakti ilin)

## Regularo
Vikipedio ne estas tute libera. Por eviti kaoson, la vikipediistoj kune decidis pri kelkaj fundamentaj reguloj rilate al nomoj, ortografio, signa aspekto, grafika aspekto, kaj vortelekto. Tiuj reguloj ne estas netuŝeblaj, sed povas esti modifataj post zorga kaj finkonsenta diskutado inter la vikipediistoj. Se neeblas plena konsento pri regulŝanĝo, oni povas decidi per baloto.

**Ekzemploj**
**Landnomoj**
Landnomoj estas tradicia temo por disputoj en Esperantujo. En Vikipedio oni listigas je http://eo.wikipedia.org/wiki/Landonomoj superrigardon de la diversaj uzataj formoj.

La nomo preferata de la esperantlingva Vikipedio havas ligilon al la artikolo pri la koncerna lando. Ekzemple oni uzu la formon “Belgio” anstataŭ “Belgujo”.

**Majuskligo de familia nomo**
Komence oni majuskligis ĉiam familiajn nomojn. Post balotado estis decidita tion ŝanĝi. Nun oni ne plu majuskligas la familian nomon en titolo de artikolo, sed nur en la komenco de artikolo.

La majuskligo de la familia nomo helpas al la leganto scii, kiu parto de la nomo estas la familia nomo (ĉar ja en kelkaj kulturoj la familia nomo aperas komence de la nomo, dum en aliaj kulturoj ĝi aperas fine de la nomo).

## Komuniki kun vikipediistoj

**Sinprezenta paĝo**
Liston de kunlaborantoj al la esperantlingva Vikipedio vi trovos ĉe http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Vikipediistoj

Ĉiu vikipediisto havas paĝon en kiu li aŭ ŝi sin prezentas. Vi povas tie aldoni informojn pri via lingvokono per jena ekzempla kodo:
{{babel-6|nl-D|eo-3|fr-2|en-2|de-1|pl-1}}

**Saluti novan kunlaboranton de Vikipedio**
Se vi volas bonvenigi novan kunlaboranton, vi povas fari tion en la diskutpaĝo ligita al ties persona paĝo. Tiu novulo tiam ricevas mesaĝon, bone videblan en la supro de la ekrano. Tiu mesaĝo montras ke iu sendis ion. La bonveniga mesaĝo ĉiam estu afabla, ankaŭ se vi rimarkas ke la novulo ne estas spertulo pri verkado en Esperanto.

Ekzistas ŝablono kiu donas koncize multajn informojn en bela aspekto: {{bonvenon}} Estas rekomendinde uzi tiun ĉi ŝablonon kaj "subskribi" ĝin per kvar sinsekvaj signoj "~" (detalojn pri tio vi trovos je la sekva paĝo). Se la novulo ŝatas vian bonvenigon, ŝi aŭ li povos tuj reagi kaj jam la unua persona kontakto establiĝas. Tia persona aprezo estas tre grava por entuziasmigi novulojn.

**Sendi retmesaĝon al vikipediisto**
Se vi volas reagi al informo kiun vi trovis, sed preferas unue inter-konsiliĝi kun la verkinto, sen postlasi spuron en la (historio de) Viki-pedio mem, eblas sendi retmesaĝon al la verkinto de la informo. Estas kelkaj kondiĉoj: unue la verkinto devas esti ensalutinta kiam li/ŝi estis redaktanta la informon kaj due la verkinto devas esti en-metinta sian retpoŝtan adreson en la personaj preferoj. Se tiuj kon-

diĉoj estas plenumitaj, vi povos elekti la vikipediistan paĝon de la verkinto kaj (maldekstre en la menuo) klaki sur “Retpoŝtu”. Tio funkcias ene de la vikipedia programaro, do eblas uzi tiun eblecon sendepende de via propra retmesaĝilo.

**Diskuti pri artikolo**

Se vi volas esprimi vian propran opinion pri temo, bonvolu ne fari tion en la artikolo mem. Eblas tion fari en la diskutpaĝo ligita al la artikola paĝo. Povas okazi ke vi trovas konceptan eraron en artikolo pri iu temo, sed vi ne kapablas korekti tion aŭ vi ne trovas la tempon por tuj prilabori tion.

Tiam estas bona solvo priskribi la problemon en la diskutpaĝo de la koncerna artikolo: tiel vi atentigas la aliajn kontribuantojn pri la eventuala korektendaĵo sen rekte interveni aŭ ŝanĝi.

Se vi jam havas konton en la Vikipedio, vi povas facile subskribi viajn kontribuojn al la diskutoj per aldono de ~~~~ (kvar tildoj) fine de la artikolo. Kiam vi klakas sur “Konservu ŝanĝojn”, tiuj ~~~~ estas aŭtomate anstataŭigataj per via vikipediista nomo kaj la preciza tempo de tiu redakto. Estas bone tiel subskribi ĉiujn viajn kontribuojn al diskutoj, ĉar tiel la aliaj vikipediistoj vidos, kiu kiam skribis kiun kontribuon. Tamen, vi neniam uzu tian subskribon ene de la artikolo mem, sed nur en diskutpaĝoj!

Bona uzo de la diskutpaĝo estas mencioj pri etimologio kaj eventualaj indikoj pri fontoj (vortaroj, revuoj, ktp.)

Ankaŭ okazas ke la diskuto ligita al simpla artikolo fariĝas tro ampleksa. En tiu kazo oni preferas transmeti la diskuton al la ĝenerala “Diskutejo” (en la menuo maldekstre).

**Voĉdoni**

Ĉiusemajne elektiĝas la Artikolo de la semajno (kvalite elstara artikolo) kaj la Kunlaboraĵo de la semajno (plibonigenda artikolo). Vi povas voĉdoni por proponitaj artikoloj, mem proponi artikolon, ktp. Ankaŭ pri aliaj aferoj oni devas voĉdoni, ekzemple ĉu roboto rajtas aŭtomate alŝuti certajn artikolojn. La vikipedia komunumo ankaŭ foje uzas voĉdonadon por decidi pri iuj aferoj pri kiuj ne troveblas konsento, ekzemple kiam temas pri propono ŝanĝi iun el la vikipediaj reguloj.

## Statistikoj

Eblas ekhavi statistikojn pri Vikipedio ĝenerale, viaj kontribuoj kaj kontribuoj de iu ajn alia vikipediisto.

### Vikipedio mem


Tre detalaj statistikoj pri la esperantlingva versio de Vikipedio vi trovos ĉe http://stats.wikimedia.org/EO/TablesWikipediaEO.htm Atentu: la statistikoj ne ĉiam estas tre aktualaj, ĉar krei ilin malrapidigas la tutan Vikipedion.

### Specifa uzanto

Plej facile vi povas vidi la kontribuojn de certa vikipediisto se vi anstataŭas la XXX-ojn en la ĉi-suba ligilo per la nomo de la uzanto: http://eo.wikipedia.org/wiki/Speciala:Contributions/XXX

### Serĉiloj por Mozilo

Se vi uzas Firefox, vi povas instali rektan kaj rapidan serĉilon por Vikipedio dekstre de la fenestro.




Por instali ĝin en plej diversaj lingvoj, vizitu http://mycroft.mozdev.org/quick/wikipedia.html

**Permesilo de GNU por Liberaj Dokumentoj**

Tiu ĉi broŝuro estas grandparte bazita de tekstoj en Vikipedio mem kaj komune verkita de kelkaj aktivuloj. Wikibooks.org tion ebligis. La manlibro en elektronika formo troviĝas je la jena adreso: http://eo.wikibooks.org/wiki/Manlibro_pri_Vikipedio

Tiu ĉi broŝuro estas senkopirajta. Ĝi estas disponigita laŭ la permesilo GFDL. La oficiala, anglalingva teksto pri tio vi povas retrovi je http://www.gnu.org/copyleft/fdl.html. Neoficiala esperantigo legeblas je http://eo.wikipedia.org/wiki/GFDL/esperanta_versio

# Enhava tabelo


| | |
|---|---|
| Enkonduko | **paĝo 2** |
| o Antaŭvorto | paĝo 2 |
| o Kio estas Vikipedio? | paĝo 3 |
| o Historio de Vikipedio | paĝo 3 |
| o Grava multlingva projekto | paĝo 4 |
| o Respondoj al kritikoj | paĝo 5 |
| Kial verki por Vikipedio? | **paĝo 7** |
| o Ĝenerale | paĝo 7 |
| + Filozofio de Vikipedio | paĝo 7 |
| + Vikipedio kiel konservejo de artikoloj | paĝo 8 |
| kaj fotoj | paĝo 8 |
| + Verki pri via regiono kaj kulturo | paĝo 8 |
| + Verki pri via fako | paĝo 8 |
| + Estas amuze! | paĝo 8 |
| o Kial Vikipedio en Esperanto? | paĝo 9 |
| + Ekzerci Esperanton | paĝo 9 |
| + Montri al la mondo ke eblas ĉion esprimi per Esperanto | paĝo 9 |
| + Normigo de la lingvo | paĝo 9 |
| + Vikipedio kiel informilo pri Esperanto en nacilingvaj versioj | paĝo 9 |
| Kiel redakti paĝon - bazaj reguloj | **paĝo 11** |
| o Enciklopedia | paĝo 11 |
| o Neŭtrala vidpunkto | paĝo 11 |
| o Libera, laŭ GFDL | paĝo 12 |
| o Respekta | paĝo 13 |
| Kiel redakti paĝon - praktike kunlabori | **paĝo 14** |
| o Elstaraj artikoloj | paĝo 14 |
| o La unuaj provoj | paĝo 14 |
| o Specialaj signoj | paĝo 15 |
| o La provejo | paĝo 16 |
| o Se al vi plaĉas la redaktado... | paĝo 16 |
| + Kiel krei konton? | paĝo 16 |
| + Verki novan artikolon… | paĝo 16 |
| + Konsiloj por redaktantoj | paĝo 17 |
| + Uzi kodojn | paĝo 17 |
| o Redaktokonflikto | paĝo 18 |
| o Tabelo kun ekzemplaj kodoj | paĝo 19 |

## Enhava tabelo


o Bildoj paĝo 20
+ Alŝuti paĝo 20
+ Uzi bildon en artikolo paĝo 20
o Kopirajto paĝo 20
+ Kopiado el la Vikipedio paĝo 21
+ Kopiado al la Vikipedio paĝo 22
o Kategorioj paĝo 22
+ Kiel aldoni kategorion paĝo 22
+ Ordigaj ŝlosiloj paĝo 22
o Ŝablonoj paĝo 22
+ Aliaj ekzemplaj ŝablonoj paĝo 23
o Ceteraj sciindaĵoj paĝo 23
+ Intervikio paĝo 23
+ Ŝanĝi la titolon de artikolo paĝo 24
+ Alidirekti artikolon paĝo 24
+ Atentigi pri artikolo paĝo 25
+ Reiri al antaŭa versio de la artikolo paĝo 25

La vikipedia komunumo **paĝo 26**
o Administrantoj paĝo 26
o Regularo paĝo 26
+ Ekzemploj paĝo 26
o Komuniki kun vikipediistoj paĝo 27
+ Sinprezenta paĝo paĝo 27
+ Saluti novan kunlaboranton paĝo 27
+ Sendi retmesaĝon al vikipediisto paĝo 27
+ Diskuti pri artikolo paĝo 28
+ Voĉdoni paĝo 28
o Statistikoj paĝo 29
+ Vikipedio mem paĝo 29
+ Specifa uzanto paĝo 29
o Serĉiloj por Mozilo paĝo 29

Permesilo de GNU por Liberaj Dokumentoj **paĝo 29**



varsovia vento
podkastoj de varsovia vento — dufoje en monato

Vikipedio estas projekto por la konstruo de libera reta enciklopedio en multaj lingvoj. Ĉiuj — inkluzive ĉiu leganto — povas redakti ĉiun artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolojn, skribeti, aŭ skribegi.

Tiu ĉi broŝureto estas praktika manlibro por ĉiu kiu interesiĝas pri Vikipedio. Ĝi celas klarigi kial Vikipedio estas tiel grava kaj doni praktikajn konsilojn al interesitaj kunlaborantoj.

Ni invitas vin malkovri Vikipedion kaj ekkunlabori al projekto kiu estas nova ŝanco por la Esperantomovado.

Uzu tiun ĉi broŝureton kiel kursmaterialon, transdonu ĝin al amiko. Sciigu al (ne-)esperantistoj pri la daŭre kreskanta reta enciklopedio en la internacia lingvo.

*La estraroj de la flandra kaj pola Esperantojunularo.*

----

"Fine mi ŝatus plenvoĉe kanti la laŭdon de la Esperanto-Vikipedio. La sola papera Esperanto-Enciklopedio estis finredaktita en 1933. La Esperanto-intelektuloj multe diskutis pri reviziado, eĉ iomete komencis, sed ne atingis konkretan rezulton - kaj oni apenaŭ aŭdacis revi pri enciklopedio de la ĝenerala mondo.

La nuna Esperanto-Vikipedio estiĝis danke al la entuziasma laboro de komputilaj fakuloj kaj aliaj kunlaboremuloj. Ĝi certe jam nun estas unu el la grandaj progresoj de Esperantujo dum la pasintaj kvardek jaroj, unu el la paŝoj de lingvo, kiun oni proponas al politikaj instancoj, al lingvo, kiun la Esperanto-parolantoj povas uzi en sia ĉiutaga vivo."

*Lu Wunsch-Rolshoven en Libera Folio*



TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

June kaj Kune